

Christian Winther,  
Flugu, ho bird'

*tradukita de Kristian Langgaard*

Flugu, ho bird' trans la ondojn de l' lago!  
Nigra la nokt' venos nun.  
Jen post l' arbar' malleviĝas la tago  
kaj ŝtelforiras la sun'.  
Nun vi rapidu al via ino pluma,  
kaj flavbekuloj apud ŝi;  
sed kiam tago krepuskos, la luma,  
diru pri ili al mi!

Flugu, ho bird' trans la ondojn brilantajn!  
Via flugil' portu vin!  
Se vi renkontos du homojn amantajn,  
ho – vi esploru ŝin kaj lin!  
Kiel poeto ja koni mi devus  
ĉion pri l' feliĉ' de l' am',  
ĉiun doloron – la voĉon mi levus  
en ovacia deklam'.

Flugu, ho bird' trans la siblon de l' lago!  
Amo vin logas al ŝi.  
Sidu nun inter susuro de l' fago,  
kantu pri ŝi kaj pri vi!  
Se ankaŭ mi en l' aer' mi povus levi,  
sciis mi, kien iros mi.  
Mi en arbar' povas nur plendi, revi -  
- nura amfrukto por mi.

...

Christian Winther,  
Flyv fugl, flyv

Flyv fugl, flyv over Furesøens vove!  
Nu kommer natten så sort,  
Alt liger sol bag de dæmrende skove,  
Dagen den lister sig bort;  
Skynd dig nu hjem til din fjedrede mage,  
Til di guulnæbede små;  
Men når i morgen du kommer tilbage  
Siig mij så alt hvad du så!

Flyv, fugl! flyv over Furesøens bølge,  
Stræk dine vinger nu vel!  
Ser du to elskende, dem skal du følge,  
Dybt skal du speide deres sjæl.  
Er jeg en sanger, så bør jeg jo vide  
Kjærligheds smigrende lyst,  
Alt, hvad et hjerte kan rumme og lide,  
Burde jo tolke min røst.

Flyv, fugl! flyv over Furesøens rislen,  
Kjærlighed kalder dig hjem;  
Sæt dig nu kjønt mellem løvbuskens hvislen,  
Syng så din kjærlighed frem!  
Kunde, som du, jeg i ætheren svømme,  
Veed jeg nok, hvor gik min flugt;  
Jeg kan i lunden kun sukke og drømme,  
Det er min kjærligheds frugt.

...

Flugu, ho bird' trans la bluan akvaron!  
 Flugu al ŝi - flugu for!  
 Ie vi trovos solecan arbaron,  
 kien sopiras la kor'.  
 Ora harar' flirtetas en venteto,  
 rekta, gracila estas ŝi,  
 nigraj okuloj kaj roza vangeto,  
 ho - tuj ŝin konas ja vi.

Flugu, ho bird', trans la lagan bruadon !  
 Aŭdu! La nokta ĝemad'!  
 Flustras la arboj timeman sibladon -  
 estas vespersalutad'.  
 Ĉu vi aŭskultis? Eĉ inter birdaro  
 - granda, profunda amdolor'!  
 Diru nun en la malluma arbaro  
 bonnokton al mia kor'!

*Traduko de la Dana poemo "Flyv fugl, flyv" de CHRISTIAN WINTHER (Kristiano Vintero, \*1796 - †1876) en Esperanton de KRISTIAN LANGGAARD (\*1894 - †1957).*

*Arg-355-704 (2009-05-16 15:18:45)*

*Origina tradukversio de Kristian Langaard, troviĝanta en la libreto "Esperanto-poemoj", eldonita en 1937 de la eldonejo "SEFO", Nykøbing, Danlando.*

Flyv, fugl! flyv over Furesøens vande,  
 Langt, langt bort i det blåe!  
 Eensomt i skoven ved fjerneste strande  
 Seer du min favre at gåe.  
 Guulbrune lokke de flagre i vinden,  
 Let er hun, rank som et ax,  
 Øiet er sort, og roser har kinden,  
 Ak! du kan kjende hende strax!

Flyv, fugl! flyv over Furesøens brusen,  
 Dybt drager natten sit suk!  
 Træerne hviske med ængstelig susen,  
 Hils Godnat med et buk!  
 Har du ei lyttet til mangefold smerte  
 Selv hos den fjedrede flok?  
 Siig et Godnat til mit bævende hjerte,  
 Siig det, du veed det jo nok.

*Verkinto de tiu ĉi Dana poemo estas CHRISTIAN WINTHER (Kristiano Vintero, \*1796 - †1876).*

*Arg-355-702 (2009-05-16 15:21:37)*

*Tiu origina dana-lingva teksto estas troveble interalie en la retejo <http://www.recmusic.org/lieder/w/winther/>.*